1/07

# Arbetar Esperantisten

N-o 3, 1951
30:a JARO
LABORISTA ESPERANTISTO



ta, ĝenerale ĉiuj artefaritaj lingvoj estas multe pli perfektaj ol la naturaj lingvoj — sed per la ĉie kreskanta sento de naciismo, la fiero havi propran lingvon kaj la volo uzi gin. Per aliaj vortoj la enkonduko de Esperanto estas nure politika problemo.

Mi pli frue iam skribis, ke la ŝancoj por Esperanto estus bonaj, kiam ni havus trian potencon pli aŭ malpli memstaran en Eŭropo, nome la Unuiĝantaj Ŝtatoj de Europo. Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne havas tiun potencon. Ŝajnas kontraŭe, ke la unuopaj ŝtatoj en Eŭropo estos devige unuigitaj de Usono, la unua signo la supera komandanto Eisenhower estas amerikano, kaj tio signifas, ke la reganta lingvo en la Okcidento fariĝus la angla. En la Oriento ĝi jam estas la rusa. Ni do ankaŭ havas du lingvajn blokojn. En tiu kazu la ŝanĉoj por Esperanto estas nulo. Se ni volas, ke Esperanto venku, ne sufiĉas ke ni parolas kaj uzas ĝin, ke ni faras kursojn ktp. sed la plej grava punkto estas, ke ni devas krei la politikajn kondiĉojn por tio. Kaj ilin ni nur povas krei en niaj diversaj fakaj, politikaj kaj kulturaj organizajoj, kiuj ankaŭ havas la necesan forton realigi siajn decidojn.

Ni staras hodiaŭ je vojkruciĝo. Aŭ estos eble krei komunan tutmondan registaron kun komuna lingvo por ĉiuj, aŭ se tio ne sukcesas tiam estas du alternativoj verŝajnaj: aŭ ni detruas ĉiun homan vivon kaj eble nian mondon per la fortoj de la hidrogenbombo aŭ ni travivos kelkajn jarcentojn da barbareco, dum kiuj ni devas komenci ekde komenco. La vojo, kiun ni elektas, estas en niaj propraj manoj, ne ekzistas supera forto kiu decidas tion por ni, sed ni mem, ĉiu el ni, devas decidi kaj agi laŭ sia decido, forĵetante ĉiujn malnovajn restojn de eventuala naciismo. Aŭ ĉiuj homoj havas samajn rajtojn egale al kiu raso aŭ koloro ili apartenas, aŭ ni perdos la rajton vivi. Tiu estas la leĝo de la evoluo de la homaro. Ni esperantistoj ja ĉiam batalis por egaleco de ĉiuj homoj, ni do montru nin indaj je tio ankaŭ en tiu nova, fataloplena jaro.

*W. Entrich.*

Karaj samideanoj: Por propagandi *nian karan lingvon* mi deziras trovi ĉiujn Esp. Poŝt-tampojn aperintajn tra la mondo, do mi restus tre dankema al vi se vi havus la bonecon publikigi en via revuo la kunmetitan anoncon.

Iom post iom la movado revivas en mia lando kaj mi estas certa ke kun la bona helpo de la eksterlanda samideanaro ni povos montri al tiuj, kiuj ne kredas pri la efektiveco de Esperanto, ke ĝi vivas vigle kiel neniam.

Ankaŭ mi restus tre dankema al vi se vi havus la afablecon sendi al mi provnumeron de via revuo, ĝi servos por estonta ekspozicio kiun ni pensas fari.

Korajn antaŭdankojn kaj samideane kaj amike via

Ramón Molera

Stro. Hospital, 13

*Moyá* (Barña)

*Hispanujo.*

*Italio.* En la plejgrada lernejo »Col di Lana« en Romo, en kiu instruas Profesorino Adelaide Antonelli, fervora esperantistino. Ŝi rakontas, ke ŝi ankaŭ havas Esperanton sur la leciona horaro kaj instruas nun Esperanton al 32 lernantinoj, kiuj kun granda intereso lernas la lingvon.

## Kial ne vi aliĝis al la SAT-kongreso?